EKO 2022
Esperiga Komuniko

Subtene al la regiona, landa kaj loka agado

UEA ILEI IF EF

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbeglo Koffi, Elda Doerfler

**ENHAVO n-ro 27>** • Universitatoj • UN • Lingva koalicio • Togolando **< majo 10**

# Universitataj diskutoj kaj defio al niaj sciencistoj

Karaj Dennis kaj universitatanoj:

Ekzistas traduko de Ĝenerala, Organika kaj Bio-kemio de Stoker, mi havas permeson reeldoni ĝin, sed mankas al mi laborfortoj por la treege malfacila tasko finpretigi la manuskripton. Mi certe emus kunordigi grupon de entuziasmaj kemiistoj/sciencemuloj kiuj volus kunlabori en la projekto (mi laboras per LaTeX, scipovi/lerni ĝin estus nepra kondiĉo).

Orlando Raola, estrarano de UEA pri kulturo

En la usona universitato-sistemo, ĉiu kurso ĉe la bakalaŭra nivelo kutime utiligas unu aŭ du librojn kiuj enhavas la kompletan kurso-materialon.  Ĉu biologio, matematiko, filozofio aŭ komerco -- por ne mencii cent aliajn fakojn – ĉiuj el tiuj kursoj estas akompanataj de ofte tre detalaj libroj.

Kaj en Esperantujo?  Aparte de la bona serio kiu verŝajne ekaperados pri interlingvistiko aŭ pri Esperanto, ĉu estas unu tiaj fakaj libroj pri ne-lingvaj temoj, tute en Esperanto? Mi konas unu, tiun de Doktoro Ron Glossop, titolitan angle *Confronting War*, kaj esperante 'Alfronti Militon'.

Mi ricevis peton de iu el la Universitato de Esperanto www.universitato.info, kaj la demando estas pri la Esperanta versio de la libro de la kurso de profesoro Glossop. Tiu libro manuskripte ekzistas, sed ĝi devas esti fintradukita al Esperanto por posta eldono.

Se estas bona okazo por eldoni universitatan libron ekster lingvo-scienco estas la libro de Glossop, kiu estis jam vaste uzata angla-versie en usonaj universitatoj, kaj kiu atingis kvar eldonojn.

Tio estas serioza, atingebla temo por esperantaj universitatanoj.  Eblas pensi ankaŭ pri libro kiu pritraktos astronomion, kaj historion de informadiko, ĉar tiuj kursoj, kompletaj -- ne prelego-serioj -- jam ekzistas ĉe la Universitato de Esperanto www.universitato.info, kaj ties lecionoj jam estis konsultitaj pli ol 20-milfoje.

Dennis Keefe

# La Novjorka oficejo konigas nin refoje

**Numero 58 – majo - junio 2022**

- Lastatempaj evoluoj en Esperanto.
- Universala Esperanto-Asocio festas Internacian Virinan Tagon kun sento de urĝo: Unuiĝintaj Nacioj "devas plenumi la laboron, por kiu ĝi estis kreita."
- Esperanto "Elemento en la kultura heredaĵo de la homaro" deklaris Lo Jacomo.

Ni alkroĉas la komunikon en Esperanto. Ĝi aperas ankaŭ france kaj angle.

# Nova koalicio de similideanoj

***Fondiĝis fare de amerikaj universitatanoj la asocio MONDA KOALICIO POR LINGVAJ RAJTOJ, al kiu rajtas aliĝi individuoj kaj asocioj, kiu devus esti io interesa por esperantistoj. Jen la priskribo de iliaj celoj:***

## NIA MISIO: LINGVAJ RAJTOJ POR ĈIUJ

"Eĉ se vi parolas superregan lingvon, vi tamen ricevas limigitan parton de la haveblaj informoj". Ni prenu Vikipedion kiel ekzemplon. Vi eble pensas, ke ekzistas en Vikipedio multaj universalaj temoj tra la malsamaj lingvoversioj. Fakte, ekzistas malpli da komuna enhavo tra la diversaj lingvoj: 74 elcentoj de la konceptoj havas artikolojn nur en unu lingvo, kaj 95 elcentoj de la konceptoj ekzistas en malpli ol ses lingvoj.

Malegalecoj pri la informoj rete haveblaj en malsamaj lingvoj rilatas al tiu kaj tio estas prezentata – kaj fare de kiu. Se vi esploras, kiel la mondo aspektas, se vi parolas la hebrean aŭ la araban, tre malsama bildo aperas rilate al tio, kio estas priskribita en la angla. Estas grandaj informaj malplenoj en neregantaj lingvoj, kie homoj, lokoj kaj kulturoj malaperas en nigran truon. Kaj kiam vi rigardas al lokoj priskribitaj en Vikipedio en malgrandaj lingvoj, iĝas evidente ke la monda sudo malaperas"  (la cifereca lingva divido – kiel la lingvo, kiun vi parolas, formas vian sperton en la interreto?)
Krome, ankaŭ se, laŭ iuj, la reto estas ilo por la malapero (aŭ ĉu nevidebligo?) de multaj el la malpli parolataj lingvoj en la mondo, la temo pri reta lingva reprezentado iĝas problemo, nur se vi kapablas entute aliri la reton.   Kvankam en 2016 Unuiĝintaj Nacioj deklaris aliron al la Interreto baza homa rajto, miliardoj da homoj en la mondo, kiuj parolas malplmo-lingvojn, plue estas senrajtaj aŭ pro siaj registaroj, kiuj malhelpas retan aliron, la manko de baza reta kunliga strukturo aŭ la manko de komputila kapablo.

Ni kredas, ke je tiu ĉi interplektiĝo de retaj, homaj kaj lingvaj rajtoj ni kune povas defii la lingvan hegemonion de malmultaj regantaj lingvoj kaj pledi por rete akceli lingvajn rajtojn. Ĉiu individuo aŭ asocio rajtas aliĝi. La aliĝilo estas en la angla ĉe https://www.coalitionforlanguagerights.org/join, Petu plurlingvigon!

Komento: SMG: La Esperanta Vikipedio eminente bonfartas, kvankam kun defioj kaj malaktualaj paĝoj. Ĝi pli bone fartas ol ege multaj negrandaj lingvoj. La siatempa programo Fox aktive strebis doni al parolantoj de minoritataj lingvoj aliron al la reto.

## Ekzamenaj rezultoj el Togolando

La dua trimestro de la lernojaro 2021-2022 en la Instituto Zamenhof komenciĝis en januaro kaj finiĝis en aprilo 2022. Ĝi konsistis el 10 semajnoj, dum kiuj okazis kursoj kaj fine ankaŭ la ekzamenoj trimestrofinaj. Jen la rezultoj de tiuj ekzamenoj !

Infanvartejo: 100% da sukceso
Elementa nivelo: El la kvin klasoj kun pli ol cent lernantoj, la sukcesoj estis 100%, 100%, 97.5%, 90,2%, 91.8% kaj 82,1%
Duagrada nivelo (Kolegio): La sukcesoj gamis inter 80 kaj 90%

En la lasta trimestro, la gelernantoj de la sesa klaso de la elementa nivelo kaj tiuj de la kvara klaso de duagrada nivelo trapasos ŝtatajn ekzamenojn. Apartaj preparlaboroj okazas por ili.

## La lastaj tagoj de Zamenhof

*Vortoj de la frato, d-ro Leono Zamenhof:*

"La 14-an de aprilo la stato de d-ro Z. rapide pliboniĝis; la koro komencis labori pli forte, kaj malaperis la signoj de ĝia akra nesufiĉeco. La kuracistoj havis esperon, ke venos pliboniĝo.



Tiel pensis ankaŭ la mortinto la lastan tagon malgraŭ granda senfortiĝo. D-ro Ludoviko estis en tre bona humoro. Li eĉ rakontis al la ĉirkaŭantaro siajn anekdotajn sonĝojn kaj faris al si esperon, ke post longa interrompo li povos la alvenantan nokton pasigi oportune en sia lito...

Je la 5-a horo vizitis lin lia konstanta kuracisto kaj amiko d-ro K. kaj konstatis ĉe li efektivan pliboniĝon. Post duonhora amika interparolo, sentante sin iom laca, mia frato petis la permeson de d-ro K., ke Zamenhof iom ripozu sur divano. Ĝi estis lia lasta memvola movo! Kiam lia edzino alproksimiĝis, por prepari al li oportunan kuŝejon, ŝi jam trovis sian edzon malviva! La morto alvenis subite kaj, kiel deziris la mortonto, sen turmentoj. Li foriris el ĉi tiu mondo kun plej bonaj pensoj, tute ne sentante, ke li forlasas ĝin por eterne!"

*En la nomo de la estraro de Hungaria Esperanto-Ascoio*
*Gyöngyi Mézes (Perla Mielo), estrarano*

========= vortoj: 1025 =========

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis la **fino de 2021** (per EKO 2021-58). Tuj realigota estas aldono de la kolekto 2022 ĝis numero 25. Vidu la komunikojn laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.